SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban* - 66-**PERPIGNAN** (P.-O.) - *Telefono 34-38-84*

Jara Abono : 3 F. – C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 41 speciala - decembro 1971

# RAPORTO PRI LA KOMITATA KUNVENO DE LA 24-a DE OKTOBRO 1971 EN NARBONNE

La dimanĉon 24-an de oktobro 1971, je la 10-a matene, okazis en la Junuldomo de Narbonne Komitata Kunveno de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono".

Partoprenis la kunvenon :

Ge-roj RAYNAUD el Alès ; S-inoj AUTHIER kaj BENTZ, F-ino TERRAL el Bériers ; F-ino VIERNE el Montpellier ; Ge-roj DELIGNE kaj LOUBIC, S-ro SAYAG el Narbonne ; S-ro ABOULKER, ge-roj VOLPELIERE el Nîmes ; S-roj AMOUROUX kaj LLECH-WALTER, F-inoj VERRY kaj VIDAL el Perpignan. Partoprenis ankaŭ la kunvenon kelkaj gelernantoj el S-ro DELIGNE.

Ĉar la kunveno estis bone organizita, ĉio iris glate kaj rapide dum la debatoj, kaj ĉiu povis esprimi sian opinion pri la diversaj temoj de la tagordo.

S-ro LLECH-WALTER, Prezidanto, malfermis la kunvenon kaj observigis al la ĉeestantaro unu minuton da silento je la memoro de S-ro Bernard CONSTANS kiu mortis la 21-an de februaro 1971.

Poste li legis la agadraporton de la Federacio kaj donis la parolvicon al S-ro DELIGNE, nia kasisto, kiu prezentis tre detalan kaj precizan financan raporton.

Oni decidis agi apud la asocioj de gepatroj de lernantoj, ĉe la ĝeneralaj konsilioj kaj apud la parlamentanoj por enkonduko de esperanto en la lernejojn. S-ro LLECH-WALTER, kiu jam agis en la departemento "Pyrénées-Orientales", sendos modelon al ĉiujgrupoj de la Federacio por ke ili faru same.

Ĉar F-ino VERRY baldaŭ edziniĝos kaj forlasos nian regionon, S-ro Jean AMOUROUX, 1, Rue de Sorède - 66 - PERPIGNAN anstataŭiĝos ŝin, ĝis la proksima Federacia Kongreso, ĉe la sekretariato.

.../...

Oni ankaù parolis pri la U.F.E. -kotizoj kaj estis konsilite al ĉiu grupa kasisto kolekti la monon antaù la fino de la jaro por ke - dum januaro - la federacia kasisto estu ricevinta ĉiujn kotizojn.

la 1972-a Federacia Kongreso okazos en Balaruc-les-Bains, la dimanĉon 19-an de marto. En la venonta numero, vi povos legi pri le diversaj manifestacioj kaj aranĝoj antaùvidotaj okaze de tiu kongreso.

Por konkludi ni povas diri ke la laboro estis serioza kaj fruktodona por la estonto.

M. V.

KUNVENO DE LA 24a de OKTOBRO, en NARBONO

Okaze de la Federacia Kongreso en Nimes en Marto 1971, mi ne havis, bedaùrinde, tempon por prezenti al vi nian bilancon en tute.

Tio, kion mi prezentas hodiaù, ne estas bilanco, ĉar oni povas fari ĝin, nur kiam la kotizoj estas enkasigitaj. Tio estas nur financa situacio komparita kun tiu, kiun mi prezentis en Decembro 1970.

| | 1970 | 1971 |
|---|---|---|
| Poŝtaĉekkonto | 230,83 | 137,83 |
| kaso | 0 | 22,30 |
| Ŝparkaso | 210,00 | 221,14 |
| | 440,83 | 381,27 |

La diferenco inter ambaù sumoj ne signifas multe, ĉar en decembro 1970 mi jam enkasigis kotizojn, kaj tio ne ankoraù okazis en Oktobro 1971. Tio estas nur por alĝustigi la aferon.

Pri la kotizoj mi permesas al mi, memorigi al ĉiuj, por ke ĉio bone funkciu, necesas ke tiuj kotizoj estu pagitaj senpere al la grupaj kasistoj, kaj ne al mi.
Same, estus dezirinde ke ili estu pagitaj plej malfrue, je la fino de Januaro.

Laù iliaj eblecoj, mi petas al ĉiuj kasistoj konigi al mi la naskiĝdatojn de siaj grupanoj. Tio estas petita al mi de U.F.E.

---

Jen por la pago de la kotizoj, kaj nun mi ŝatus fari du demandojn por mia propra informo.
Jen la unua - al kiu povos sendube respondi la malnovaj esperantistoj.
Kiam membro pagas kotizon al U.F.E. unu parto revenas al la Federacio, kaj unu dua parto iras al U.E.A.

Sed, kiam oni pagas kotizon nur por U.E.A. , nenio revenas nek por ni, nek por U.F.E. Tamen la laboro estas la same por mi kaj sendube por la UFEa kasisto. Kial ?

.../...

Jen la dua. Mi ne havis eblecon partopreni nek en la nacia nek en la universala kongresoj kie, mi opinias, oni diskutis pri la pliigo de la kotizoj.

Antaŭ tiu pliigo, kiam federaciano, pagis ekzemple 6 franckojn, I franko revenis al la Federacio, tio estas, 16,7 %

Nun, kiam la sama federaciano pagas 7 frankojn, revenas ĉiam al ni I franko, tio estas 14,3 %


Do, kiam la kotizo pliiĝas el 16,7 %, nia parto malpliiĝas el 2,4 %. Kial ? ĉar mia laboro restas la sama kaj niaj korespondadaj elspezoj ankaŭ. Do, tio ne ŝajnas al mi ĝusta.

---------------

Mi opinias ankaŭ, pur la financa plano, ke oni povus plibonigi la funkciadon de Sud Franca Stelo.

Necesus ke la abonoj estu pagitaj samtempe kiel la kotizoj, kaj ne, kiel tio okazastro ofte, unuope kaj je diversaj periodoj de la jaro ; ĉar, mi estas tiam devigata fari ĉekon kaj leteron al Sro FRUS ; do ĉiufoje okazas malutila elspezo por papero, koverto kaj poŝtmarko, neenkalkulante perditan tempon, kaj malutilajn komplikaĵojn.

Finance parolante, mi ne scias ĉu la funkciado de nia ĵurnale estas profitdona aŭ ne. Fakte, mi opinias ke ĝi estas profitdona, ĉar mi kredas memori ke, okaze de la lasta kongreso S-ro FRUS diris al mi ke li havas monon kaj ne scias kion fari el ĝi.
Tiu mono estas laŭ mi, pli bone lokita en nia ŝparkaso.
Mi enkasigus la abonojn kaj pagus al S-ro FRUS funkciadajn fakturojn.



Verŝaine ĉi jaro ni povus eviti iri, fakte jam eknaskiĝis fortega idealo rilate klopodo al Esperantismo, al ĉiuj niaj Lângvedok-rusiljonaj samideanoj-----

La 27-a KONGRESO DE S. A. T. AMIKARO

Okazos en Narbonne (Francio) la 1, 2, 3, 4 de aprilo 1972




Informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe :

S. A. T. Amikaro, 67 Bd Gambetta - PARIS 20ème

aŭ ĉe :

P. LOUBIC, Verda Stelo, Route de Carcassonne,
II NARBONNE - FRANCE

La organiz-komitato eldonis belan glumarkon kun bildo de la urbodomo de Narbonne. Po 20 por 2 F. + send Kosto 0,50 F.

NIMESA KULTURA RONDO.

La Nimesa Rondo regule kunvenas ĉiumonate en saloño de la Urba biblioteko.

Ankaŭ ni akceptis s-ron Tiblewski, kiu dum interesa prelego parolis al ni pri sia vivo en Pollando kaj montris pere de diapozitivoj, ĉarmajn pejzaĵojn de tiu lando.


Li estis akceptita de la ĝenerala sekretario de la Turisma Oficejo, kiu afable, donis al li ĉiujn informojn pri nia regiono necesajn por la tezo, kium S-ro T. celas prezenti. Trafa okazo por montri al tiu oficulo la utilecon de nia lingvo dum internaciaj renkontiĝoj kaj la eblecon paroli kum alilandanoj pri iu ajn temo.

Ĉu kun S-ro GERLIER, ĉu kum gesroj Volpelière, li vizitis krom nia urbo, la plej vidindajn lokojn de nia departemento (Pont du Gard, Aigues-Mortes, Le Grau du Roi, la Camargue, St-Gilles).

Fine de Majo, unu lernanto : S-ro URVOY sukcese trapasis la Ateston pri Elementa Lernado kaj en Julio F-ino M. SCHLUMPF partoprenis la ferian semajnon en Gresijono tre plezure kaj grandprofite.

Nia Rondo estis reprezentita ĉe la renkontiĝo de la "Vokluzaj grupoj, en Montmirail kaj ĉe la Federacia Kongreso de Dromo en Nyons".

S-roj Jannez kaj Gesroj Frus ĉeestis la U.K. en Londono kaj Ge-roj Volpèlière partoprenis la Tutmonda Kongreso de S. A. T. en Orsay apud Paris. Interesa kongreso en alloga loko, dum kiu estis starigita fako de mondcivitanoj.



# Perspektivoj kaj Proponoj rilate 1972 jaro.

La sociaj aktivecoj devus esti plimultigitaj pere de tutaj societanoj nur dank al perfekta organizado, unuigante ideoj tre diversaj, ekzaminante dum paroladoj inter ni. Nepre por plibonigi nian kauzon, estas necese la plej ofta renkontiĝon inter grupoj de nia federacio kaj aliajn.

Ne taugas, ne sufiĉas postuli esti esperantisto ; bezonas montri per zorgon, klopodon, diskutado okaze nia normala ĉiutaga vivo. Nur tiamaniere povos fakte progresi Internacian Lingvon. Ĉiuj el ni estu pioniro, kontrau aliajn gentoj el plej diversaj kondiĉoj, por kapti novaj adeptoj, certe tio ni jam scias, sed kiom el ni efike kontribuas pri tiun problemon ?

Oni devas defendi nia movado, kiam oni audas voĉoj eĉ malbonaj tamen ke farigas neutila propagando inter kiu ne komprenas la esperantistaro.

Do, montru ĉiuokaze utileco de Esperanto por la aktuala koncepto de la mondo. Rezumante oni devus labori precipe sur tiuj tri bazoj :

I N F O R M A D O

INSTRUADO

ORGANIZADO

Roberto Frus

## 2 - a INTERNACIA SILVESTRA ESPERANTO-RENKONTIĜO

De la 30 - XII - '71 ĝis la 2 - I 1972 okazos en urbo PECS (HUNGARIO) la 2-a Internacia Silvestra Esp. Renkontiĝo.



La programo enhavos :


— interkona vesperon,
— distrajn kaj kulturajn kunvenojn,
— internacian balon, k.t.p.

Ne esperantistoj ne estas akceptotai. Interesuloj kontaktiĝu tuj :

2 - a Internacia Silvestra Esperanto-Renkontiĝo, Organiza Komitato : PECS 1 - Pf. 2 - Hungario.

Jean AMOUROUX

# *La angulo de la kasisto*



Karaj Geamikoj,

Baldau alvenos la fino de la jaro, kaj denove ni devos pensi pagi nian Kotizon.    Por faciligi la laboron al ni, bonvolu pagi vian kotizon senpere al via grupa Kasisto, ne pagu unuope al mi.

Mi estus ege DANKEMA al tutan gruparon, se la KOTIZOJ povus esti pagitaj, plej malfrue, je la fino de januaro 1972.

Tiel ni evitos malŝparon da mono el diversaj Korespondantoj kaj ne forgesu, tiu mono estas ankau «VIAN MONON !»

Anticipaj DANKOJN.

La Kasisto : DELIGNE

## OKAZE FINJARA FESTOTAGOJ NI DEZIRAS PLEJ FELIĈON AL TUTAN

## LEGANTARON





Ronéotipé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II, Z.U.P. - 30 - NIMES